La Esperanto-Gironde Informilo

SEPTEMBRO 2025

N° 180

Somerfinaj mildoj

ESPERANTO-GIRONDE
KUNVENO en Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC
la 11an de majo 2025
de la 10a 30 ĝis la 16a

Ĉeestas: Eden Bernadou, Ĵanseb kaj Annie Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Gloria Gargallo, Hervé Giranton, Yoann Gourdin, Katya Gradzion, Dominiko, Seán Ó Riain, Klodin ' Pomirol, Marcelo Redoulez, Jean-François Seylier, Eric Tifon.

Senkulpigitaj: Joël Lajus, Lucienne Laroche, Olivier Moreno, Bernardo kaj Rose-Sarlandie,

Elvezio bonvenigas al ĉiuj.
Li dankas al Jean-Seb kaj Annie, kiuj gastgis la partoprenantojn de la pasinta kunveno, kaj al Marcelo kaj Janine pro la du lastaj LEGI.
Li bonvenigas Yoann kaj Eden, novbakitajn geesperantstojn. Ambaŭ estas studentoj.
Ĉiu sin prezentas.

1. Pri Brassens
Yannick: Ĝis nun 6 ekzempleroj ests pagitaj. Marcelo vendis 8 en Hispanio kaj Eric, unu plian. Sume 15 ests venditaj. Per la prezento sur la retejo ***Auprès de son arbre*** vendiĝis nur 3. Tre interesa kaj laŭda reago de la unua aĉetnto. Ni ankoraŭ anoncis la libron ĉe la listo de la Brassens-ŝatantoj.

Marcelo vendis 8 ekzemplerojn en Hispanio.
Ĉiu povas prezent la libron en Esperantaj eventoj.
Klodin': La kongreso retenis neniun procentaĵon el la prezo.
Hervé kunportos 4 en Greziljono.
Elvezio: La universitato devas aĉet unu.

2. Kunveno en Saint-Palais
Ĝi okazos venontan semajnon. Partoprenos Marcelo, Klodin', Katja, Jean-Seb, Dominiko. (Vd la raporton de Katya, p.7).
Gastgado ĉe lokaj Esperantstoj.

3. Zamenho-Festo 2025

Dominiko esploris por trovi salonon per Le Petit Grain, sed la salono ne estos havebla pro la Vintra Festo, kiu okazos la 14an de decembro. Do li devas peti de la estraro, kiu alia solvo eblas. Li same faros demandon al la koruso Yakachanter.
La celo estas senpaga salono en la Salle des Douves.
Marcelo: Ĝi estas fermita dimanĉe.
Dominiko: Oni povus inviti la koruson Yakachanter por la unua parto ; tiel estus pli da spektantoj kaj la salono estus pli facile havebla.
Estas alia solvo kun alia asocio: Café Le Fantoche.

La venonta kunveno en Le Petit Grain okazos ĵaŭdon la 15an de la 18a ĝis la 19a30.

Elvezio emeritiĝos venontjare, do Le Petit Grain estus bona solvo por daŭrigi la instruadon de Esperanto, sed ĵaŭdo ne taŭgas por li kaj Jean-Seb, kiuj partoprenas en koruso tiun tagon.

4. Traduk-rondo

Dominiko proponas starigi retan tradukgrupon por traduki blidstrion (la originala versio estas en la hispana; ĝi estis tradukita al la portugala, el kiu estis traduko al la franca, kiu estas tradukota al Esperanto).

La tradukrondo okazos mardon de la 18a al la 19a30 per Framatalk.
Klodin' demandas pliajn informojn pri la organizo.
Dominiko: La tekstaro estos sendita al ĉiuj.
Marcelo: Kiam viglis la tradukrondo en Cenon, ĉiu ektradukis parton kaj ni komparis dum la renkonto en Cenon. El tiuj proponoj, ni elektis kaj konstruis la plej taŭgan.
Dominiko sendos la tekstaron al ĉiuj, kaj ĉiu sendos sian tradukon al komuna retejo.
Elvezio petas, ke ni nepre havu la hispanan version.
Dominiko sendis la francan version ĵaudon sur la framalisto. Li baldaŭ ne plu estos disponebla por la retejo: kiu pretas anstataŭi lin ?

5. Pri la WhatsApp-grupo

Dominiko proponas migri de WhatsApp al Signal kaj fari grupon malfermatan al ĉiuj, eĉ ne membroj de Esperanto-Gironde: la celo estas konigi Esperanton kaj Esperanto-Gironde.

Sed se la grupo estos tro granda, ĝi estos malfacile mastrumebla.
La ligilo al Signal aperas je la malsupro de ĉiu informletero:
https://signal.group/#CjQKIBcauCIR-3chs7W4-zc_j3xbkAvTUA8FMalWmREpMdUsEhDpb6wEowKwFz3O4AszGjgw

Post la manĝo, Jean-Seb prezentas la afiŝon kun la teksto de la eŭropa himno, kiun li uzas en la unuaj lecionoj pri Esperanto.
Poste **Marcelo kaj Klodin'** rakontas pri la Hispana Kongreso komence de majo en Sorio.
Ili vizitis muzeon, kiu atestas pri la vivo de la keltiberaj popoloj antaŭ la alveno de la Romianoj.
La urbo estas kulture tre riĉa, urbo de la poetoj (ekz. Maĉado). Ĉiu kongresano ricevis libreton kun poemoj. Estis 150 partoprenantoj.
La libroservo estis sufiĉe abunda.
Post la kongreso, ili vizitis Zaragoson.

Poste Marcelo proponas ludojn el sia floraro.

Raportis Janine

ESPERANTO-GIRONDE
KUNVENO en Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC
la 15an de junio 2025
de la 10a 30 ĝis la 16a

Ĉeestas : Ĵanseb Brilleaud, Luca Buselli, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Katya Gradzion, Olivier Moreno, Seán Ó Riain, Klodin' Pomirol, Marcelo Redoulez, Bernardo, Maeva kaj Rose-Sarlandie, Eric Tifon.

Senkulpigitaj : Gloria Gargallo, Joël Lajus, Lucienne Laroches

Elvezio bonvenigas al ĉiuj.

1. Forumo de la asocioj la 6an de spetembro en Pesako
Elvezio pets ebligon est sur la scenejo de la 12a 40 ĝis la 13a. Eblos paroli (kaj kant) dum 20 minutoj.

2. Datoj de la venontaj kunvenoj
- 31a/08
- 28a/09
- 26a/10
- 23a/11
- 14a/12

3. Tradukrondo pri la bildstrio
Klodin' : Ĝi lamas. Ŝi ne povis partopreni pasintan mardon, kaj ests sola la antaŭan. Tradukis, kion ŝi povis. Ne estas komforte labori antaŭ ekrano. Kion proponi por plibonigi ?
Janine : La franca teksto estas mallerta, do malfacila por traduki.
Klodin' komencis korekt la francan tekston kun Geneviève kaj komparis kun la reta traduko el la portugala. Cetere la bildstrio ŝajnas ne aktuala, naiva. La hispana originalo ne plu estas havebla.

4. Z-Tago
Vjera Girard rakontos, akompanata de JoMo. Eble kelkaj kanzonoj dum la paŭzo. Neniu salono estas disponebla en Bordozo je tu dato.
Elvezio telefonos por scii, ĉu tu de kvartalo France estos disponebla.

5. Aliaj aferoj
- Elvezio : Dominiko informis per Signal, ke la Esperanta versio de *Ne timigas nin ruinoj* estas rete disponebla.

- Pri Brassens

Yannick : 18 ekzempleroj estis venditaj. Li ankoraŭ ne informis pri tio sur la retejo de la Brassens-ŝatantoj. La unua aĉetinto, Jean-Paul Sermonte, publikigis anoncon en la revuo *Les Amis de Georges.*

Marcelo havas 8 ekzemplerojn, el kiuj 3 por la desegnisto; Eric havas 5 ekzemplerojn; Hervé prenis 4.

Elvezio : En la universitato, « la aĉeto estas survoje ». La libro estas malfacile trovebla sur la retejo ***Auprès de son arbre.***

Yannick : Per tiu retejo vendiĝis nur 2. Proponos al UEA kaj al Muzeo de Sète. Eble oni povas proponi ankaŭ al Greziljono.

Jean-Seb : Ne estas afiŝo de la libro sur la retejo de Esperanto-Gironde.

- Pri la aliĝoj :

Yannick : 26 kotizintoj

Marcelo la 6an de junio partoprenis en elsendo de Radio Esperanto en Parizo (ĉe Radio Libertaire). Ĉiam simpatia afero. Radio Esperanto estas unu el la plej longdaŭraj elsendoj ĉe Radio Libertaire, fondita de Yves Peyraud, la impulsinto de la origina grupo, kiu fariĝis Esperanto-Gironde. La elsendo estas dulingva, tradukita al la franca dum la prezento. Li parolis pri la « franclingva ŝlagro en Koreio » (vd LEGI 174, p.9) kaj pri la alzaca kanto (vd LEGI 177, p.28).

Post la manĝo, **Marcelo** proponas portretojn de la « Heroinoj de la popola printempo : la virinoj de la Pariza Komuno de 1871 ». Li vizitis subĉielan ĉiteman ekspozicion en la 19a distrikto de Parizo la 15an de junio 2025.

Interalie estas prezentitaj :

André Léo (Victoire Léodile Bérard), 1824-1900
Victorine Brocher, 1839-1921
Joséphine Marchais, 1837-1874
Louise Michel, 1830-1905
Nathalie Lemel, 1827-1921
Elisabeth Dmitrieff, 1851-post 1910
Alix Payen, 1842-1897

Ni aŭskultas la kanzonon Die Frauen der Komune, kantitan en la franca kaj en Esperanto en la spektaklo de 1997.

Raportis Janine

Raporto pri la Printempa Eŭska Renkontiĝo en Saint-Palais.

Preskaŭ dek-ok venis kun feliĉo,
Ĉiu portis sian etan riĉon:
Lingvon, kanton, ridon kaj sperton —
Kaj Esperanton, kiel komunan kernon.

La unua tago — festo grandioza:
Euskaraldia kun manĝaĵo revoza.
Dancoj, kantoj, marŝo kun kostumoj —
Kaj eŭska spiro inter la parfumoj.

Sabate ni iris al arta festeno,
Kun afrika koloro kaj viva sceno.
Matene tra stratoj kun ridoj sonor',
Fotiloj enmanaj — ne ĉesis fervor'.

Homoj kunvenis el ĉiu direkto,
Kun sia kulturo, kun sia afekto.
En simpla momento, sen tre preparaĵo
Ni spertis la mondon kvazaŭ en vitraĵo

Unue — kun bildoj kaj floraj parfumoj,
Ni ĝuis virtualan montaran kurson:
Marcelo nin gvidis tra floroj kaj herboj,
Ĉiu petalo havis sian misteron.

Kaj poste — Rafa kun brilo en okulo,
Rakontis pri pastro, kun penso tre brula.
Preĝejo, vojaĝo, "modesta" vivo -
Bela rakonto, "humila" gvidilo

Vespere denove ni iris urbume —
Saint Palais radiis en vespera lumo.
La stratetoj parolis, kvazaŭ por nin gvidi,
Kaj ĉiuj retrovis tempon por iom proksimi

Post promenado – komuna manĝaĵo,
Kun kantoj diversaj kaj voĉa kuraĝo.
Ni longe babilis sen zorgo, sen saĝo,
Kaj ĉiuj ekdormiĝis en nokta pejzaĝo.

La programo? Nu, ne precize skribita,
Sed ĝuste tio donis guston de spicita.
Dimanĉo? Ĝi venas ankoraŭ mistere —
Programo kaŝita en temp' stratosfere..

***

Kaj dimanĉe finfine: ekskurso speciala,
Al Nigra Valeto, en urbo Haranbels.
Tre malnova kapelo, silenta kaj hala,
De dua jarcento — kun rakontoj pri kelt'.

Renovigita en dekdua centjaro,
La nomo: Soiartz-eko Kapera.
Unue vi vidas: eniro ne klara,
Kaj poste — du pordoj, sub ŝtona barera.

Dekstre — hospitalo, nun herboj ĝin kovras,
Maldekstre — preĝejo kun vojo solena.
La pordon ornamas baska signifo,
De epoko forpasinta, sed tre emblema.

Apude — statuo, je tempo frapinta,
Ŝtuparoj kun altecoj por kapti la menson,
Kaj malalta pordego, sin trudas humila —
Por ke ĉiu sin klini kun spirita penso.

Kaj ene: preĝejo, renovigita poste,
En la deknaŭa jarcento — kun stilo modesta.
En centro — l' reliefo: Sankta Nikolao,
En pozo de instruo, saĝa kaj honesta.

Sube — sankta ŝtono, sub ĝi relikvo,
De Sankta Nikolao — en omaĝa spirito.
Sur muro — freskoj de l' deksesa tempo,
Kaj reliefo de pelikano — por sano kaj vivo.

Ankaŭ bildoj de l' kvar evangeliistoj,
Ĉiu kun simbolo, rakontojn montranta.
Kaj ĉiu reliefo kun propra mistero —
Sed pli mi ne diras — la loko parolanta!

Ĉion vortoj ne povas sufiĉe priskribi,
Do vizitu mem por la senton ekkoni.
Kaj poste — pikniko en eŭskaj montetoj,
Por bele fini kun ridetoj kaj sonoj.

Ĉu estas pli bela ol manĝi kun amikoj,
Kaj dume spekti la Pireneojn for?
Estis renkontiĝo, mirinda kaj varma —
Mi tiel finas kun sincera kolor'.
***
Kaj poste — adiaŭo. Ne kun malĝojo,
Sed kun promeso: "Ĝis revido, amiko."
Ĉar tia sperto ne finas per nokto —
Ĝi daŭras en koro, kiel ĉiela lumo.

Raportis Katya

(ARDA) ANEKDOTO

Diable! Kio estas tio? grumblis mi antaŭ kelkaj tagoj, nokte revenante hejmen. Jen stranga plektaĵo en la lumo de la aŭtoreflektoroj sur la ekstera muro de la garaĝo.

Alproksimiĝinte, mi konstatis, ke mi surprizis nur pasiegan limakamoran scenon...

La morgaŭon, ambaŭ kulpantoj tute malaperis, restis nur la mukospuroj, jam sekiĝintaj.

Janine

Kineja filmo - grava konkretigita projekto

NE TIMIGAS NIN RUINOJ

de Yannis Youlountas

Bela komuna entuziasmo rakontinda... por filmo spektinda!

Jen raporto pri neordinara aventuro: traduko de subtekstoj por dokumenta filmo.

En 2021 jam ni sukcesis ion similan por la bilda filmo *La damnitoj de la Pariza Komuno* de Rafaël Meyssan. Tiam partoprenis por la Esperanta versio: André Arnold, Nicole Blot, ĴanSeb Brilleaud, Pjer Buvje, Janine kaj Yannick Dumoulin, Miguel Fernandez, Claudine Gueguen, Klodin' Pomirol, Marcelo Redulez, Nathalie Rigault, Pedro Sanz. La tuton harmoniigis kaj kontrolis Janine kaj Yannick Dumoulin. Yannick eĉ ankaŭ zorge instalis la subtekstojn kaj tiel finpretigis la filmon, kiu estis projekciita dum la virtuala SAT-kongreso en julio 2021. La tekston kun ilustraĵoj ĉerpitaj el la filmo broŝure enpaĝigis Marcelo.

Ĉar mi memoris pri la entuaziasmo, kiu regis inter ni dum verkado de tiu unua sperto, mi tre rapide favore respondis al Flo (Floreal Martorell el Tuluzo) fine de 2023, kiam li alvokis tradukontojn kaj kunordigonton por tiu projekto.

Ni kaptis la okazon spekti la unuan provaĵon de la filmo en la kinejo Utopia la 2an de februaro 2024. La projekciado okazis en la plej granda salono de la kinejo. Ĝi estis plenplena. Dum la postfilma debato inter la publiko kaj la reĝisoro, mi demandis al Yannis, kiam li pensas sendi al ni la tradukotan tekston por la Esperanta versio. Li tiam al la publiko klarigis la gravecon de la tradukoj kaj aparte de tiu en Esperanto. Kaj li konfesis, ke necesas ankoraŭ pluraj prezentoj, kun eblaj ŝanĝoj laŭ la reagoj de la diversaj publikoj. Memorinda estas tiu vespero, ĉar konklude Christian Leduc kantis kaj kantigis "Je suis fils" sed antaŭ ol kanti, li petis kontakton "de la persono en la publiko, kiu parolas Esperanton, ĉar mi dezirus tradukon de unu el miaj kanzonoj." Kaj de tiu kontakto fontas la belega koncerto, kiun ni travivis en Pesako okaze de nia lasta Zaza-festo...

Yannis petis ke ni bonvolu pacienci, ni pacience atendadis!... plurajn monatojn...

Komuniko komence de novembro 2024, tradukita de Berto, animanto de Radio-Esperanto ĉe radio Libertaire en Parizo.

"**NOVA TURNEO** EN FRANCIO, SVISIO KAJ BELGIO... SED NE KIEL LA ALIAJ!
Post du semajnoj, ni reveturos tra Francio, Svislando kaj Belgio por tri monatoj da novaj renkontiĝoj, vidadoj kaj projekciadoj kun nove ĝisdatigita versio de la filmo *Ne timigas nin ruinoj, ni portas novan mondon en niaj koroj*.
Kiel por *Ni ne plu vivu kiel sklavoj* (2013), *Mi batalas, tial mi estas* (2015) kaj *Amo kaj la revolucio* (2018), ni revenas al vi duan fojon kun ne nur ĝisdatigita filmo, sed ankaŭ novaĵoj el Grekio, multnombraj kaj foje surprizaj, kiel certe ankaŭ vi el Francio kaj aliloke, pri kiuj ni povos diskuti. Efektive, ekde la solidara konvojo en Grekion en pasinta aprilo, multe okazis sudoriente de Eŭropo, kiel aliloke! Niaflanke, ni partoprenis en la kreado de novaj memmastrumataj lokoj, en la restarigo de pluraj antaŭe evakuitaj skvatejoj (domokupadoj), en luktoj por homaj rajtoj, por la protekto de la maro kaj vivo sur Tero.
Aperis multaj novaj iniciatoj kaj ne mankas konkretaj ideoj, por renversi la antaŭeniron de la aferoj. Nenio estas skribita, ĉio restas ebla, kondiĉe ke ni ne rezignu, ne restu en nia propra angulo, sed male per retligoj, per informado de unu al aliaj kaj plifortigante ĉie ĉi tiun deziron eliri el la mortiga senelirejo, en kiun gvidas nin tiuj, kiuj pretendas regi nin: fratmurdaj militoj, deturnita kolero, ruiniga logiko kaj tute malmoderna politika sistemo.
Sur la tabuleto:

"Nenio eblas, se vi restas spektanto, ĉio fariĝas ebla, se vi leviĝas"

KONGRUA MOMENTO

Ni bone scias, kion ni devas fari por finfine vivi en paco sur protektita planedo, en libereco kaj egaleco: pridubi nian agadmanieron en pluraj kampoj, komencante per alia maniero pensi pri produktado kaj konsumado racia kaj, kompreneble, konstruante veran demokration, horizontalan kaj nepenetreblan, fronte al potencoŝtelistoj. Vera demokratio ne nur por esti vere libera kaj egala fronte al debatoj kaj decidoj, kiuj koncernas nin ĉiujn, sed ankaŭ por permesi al kolektiva inteligenteco deplojiĝi kaj solvi ĉie la multoblajn problemojn kreitajn de "iruenmilit-emuloj" kaj la nekompetenta kaj koruptIta reganta klaso.

Tiu ĉi ŝanĝo ne plu estas nur dezirinda, ĝi fariĝis absolute necesa, urĝa kaj esenca. Ĉiuj humanistoj konsentas pri tio, sendepende de diferencoj. Ĉiuj defendantoj de la planedo ankaŭ. Estas tempo kunigi niajn diversajn luktojn al ĉi tiu komuna celo: konstrui kune novan socian organizon, kie la vortoj "Libereco, Egaleco, Frateco" ne restos mortaj sur publikaj monumentoj. La freneza politika situacio, kiu okazis en Francio dum ĉi tiu somero 2024, povas kontribui al ĉi tiu ellasilo, al ĉi tiu popola konscio, al ĉi tiu deziro rompi la aŭtoritatan kaj sterilan senelirejan vojon.

IDEOJ KAJ SPERTOJ, KIUj POVAS INSPIRI NIN

Jen la perspektivo, kun kiu invitas nin la plimulto de la lokoj kaj kolektivoj, kiuj bonvenigos nin de la 12-a de novembro 2024 ĝis la 9-a de februaro 2025. Cetere: la longan serion de projekci-debatoj en Francio, Svislando kaj Belgio (listo sube) antaŭos adekvata ateliero en Martigues. Niaj kunuloj kaj kamaradoj el Rallumeur d'Étoiles (Stelrelumigantoj) proponas al ni gastigi laborrenkontiĝon la 11-an de novembro 2024 (antaŭ la turneo) pri la temo: "Vera demokratio eblas, vera demokratio estas necesa!".

Finfine la 29an de decembro, kiel plej belan jarfinan donacon atingis nin la tradukenda frazaro.

"Bonjour les amis !
On est tous ravis de votre réponse (je suis en Grèce, au sein des collectifs, avant la reprise de la tournée du film en janvier).
Le fichier SRT est déjà prêt, avec tous les temps déjà calculés, et les phrases à traduire sont toutes en français.
Voici le fichier SRT en pièce jointe. (...)
On vous embrasse bien fort et on vous remercie encore !
Bien à vous,
Yannis et plusieurs membres des collectifs que vous avez vus dans les films"

Tuj Marcelo proponis al tridek sep geamikoj enŝoviĝi en la tradukrondon.

Gekaraj,
Yannis Youlountas proponas al ni traduki la subtitolojn de lia filmo Ne timigas nin ruinoj.
Mi proponis kunordigi la tutan laboron.
Ni ĵus ricevis la kompletan tradukendan tekston. Temas pri 700 frazoj.
Mi kontaktas vin por krei rondon por tiu tradukprojekto. Ĉu ĝi interesas vin? Ĉu vi pretas traduki kelkajn frazojn? Kiom?
Ju pli multaj ni estos, des pli malpeza estos ĉiesa tasko.
Ĉi-kune, por ke vi havu pli precizan ideon pri la farotaĵo, jen la tri unuaj paĝoj tradukotaj.
Pri la temo kaj enhavo de la filmo, vi povos spekti la prezentofilmeton, klakinte sur la ĉi suban ligilon.
Sekve, se vi konsentas partopreni en nia tradukrondo, bonvolu informi min...
Solidarece, kun niaj sinceraj bondeziroj por la nova jaro,
Marcelo kaj Klodin'

https://www.allocine.fr/video/player_gen_cmedia=19604746&cfilm=324659.html

Multaj rapidege favore respondis mendante inter 20 kaj 50 frazojn. Iuj remendis post la unua tasko. Fine partoprenis en la amika tradukrondo: André Arnold, Nicole Blot, Jean-Seb Brilleaud, Janine kaj Yannick Dumoulin, Katya Gradzion, Petro Grollemund, Françoise Guihaumé, Monique Heiderich, Claude Labetaa, Joël Lajus, Dinah MacKenzie Peers, Vito Markovo, Klodin' Pomirol, Marcelo Redulez, Laurent Vignaud.

Afiŝo de la kinejo La Lanterno pri projekciado la 11an de januaro 2025.

Tuj post nia januara kunveno, Klodin', Katya, Gloria kaj Marcelo veturis al la kinejo. Jam antaŭ la projekciado, ni sukcesis diskuti kun Yannis kaj Maud kaj ni klarigis pri la progresoj de la projekto. Mankis nur tri promesitaj paragrafoj. Venos tempoj de la kunordigado kaj harmoniigo, kaj finfine eksterlandaj korektoj.
La postfilman debaton Yannis komencis anoncante la jam tradukitajn greklingvan kaj italan versiojn kaj parolis pri la esperanta kaj petis, ke mi publike detale priskribu la evoluon de la projekto.

Du tagojn post la projekciado ni ricevis la lastan frazaron. Marcelo proponis malneton al korektontoj, inter kiuj pluraj eksterlandanoj: el

Germanio, Japanio, Hispanio, Irlando kaj Ĉinio. Tiel la definitivan version poluris Tonjo del Barrio, Janine Dumoulin, Yoshie kaj Dieter Kleemann, Sean O Riain, Marcelo Redulez, Laurent Vignaud kaj XiaoXiao.

Rezulte, la 23an de januaro tagmeze Marcelo perrete sendis la dokumenton laŭ la petita formato kun la ĉi-posta mesaĝo:

Saluton Maud kaj Yannis, karaj geamikoj,
Comme promis lors de la projection du film à Bègles, le 11 janvier, voici les sous-titres en Espéranto. Œuvre collective de 16 co-traducteurs, revue par 8 correcteurs dont une chinoise, une japonaise (vivant en Allemagne), un allemand, un irlandais (qui parle 8 langues) et un espagnol. La liste des noms des participants à cette « Amika traduk-rondo » conclut le document.
Merci de nous avoir accordé votre confiance pour nous faire partager votre réalisation.
Recevez tous nos encouragements pour tout ce que vous faites,
Amike,
Marcel"

Reage Maud kaj Yannis respondis:

"Saluton les ami.es !
Merci énormément de notre part et de la part de tous les intervenants et intervenantes ! Nos camarades en Grèce vous embrassent bien fort.
On va faire savoir tout ça bientôt ! On vous tient au courant bien sûr !
Chapeau pour la façon aussi !
Amike,
Maud kaj Yannis"

Tiun mesaĝon mi plusendis al la kuntradukintoj kaj samtage Flo respondis:

"Dankegon Marcelo pro la transdono de la informoj de Maud kaj Yannis.
Ni nun atendu la daton de la apero por spekti la rezulton.
Plej amike kaj kise al vi ambaŭ.
Flo !"

Koran dankon kaj gratulojn sendendas al ĉiuj partoprenintoj en tiu denove bela aventuro! Ni proponos komunan spektadon dum monata kunveno de Esperanto-Gironde... Ĝi estas programita en la Hispana Kongreso komence de majo!

raportis MR

Printempo ĉe ni
Parua nesto en la saliko

En nia ĝardeno staras bela saliko. Tiu alta arbo proponas agrablan ombron, kiam ardas suno. Kaj ne malofte ni profitas ĝin por manĝi ekstere aŭ simple ripozi en la silento de la kamparo.
Ĝuste sub maja lazuro, dum mi pretigis la tablon por la tagmanĝo, mi aŭdis laŭtan pepadon super mia kapo. Se mi ne tuj vidis la birdeton inter la branĉaro, mi tamen finfine rimarkis ĝiajn saltetojn de loko al loko. Ĝi tenis insekton en sia beko. Kaj admirinde ĝi pepis sen lasi sian predon fali. Mi ne plu moviĝis kaj simple demandis ĝin:
- Ĉu mi vere tiel ĝenas vin, ke mi meritas tiajn ripoĉojn? Ŝajne vi eĉ insultas min. Tamen mi promesas, ke mi neniel damaĝos vin.
Post silento mi ekaŭdis mallaŭtan pepadon sur de la trunko. Ja! el la truo postlasita de branĉego falinta kelkajn jarojn antaŭe. Tien alflugis la paruo. Mi povus precizigi: la paruino. Ŝi longe hezitis antaŭ ol enŝoviĝi en la vakuon. Plurfoje ŝi alproksimiĝis sed tuj reforflugis. Tamen iam ŝi entute enprofundiĝis kaj du sekundojn poste eliris el la nesto, sor por nova nutraĵokapto. Mi decidis foti ĝin kaj atendante ŝian revenon mi prenis mian fotilon. Sed vane! Ŝi senĉese moviĝadis, saltetis, flugetis, dekstren, supren, aliflanken... neniam mi sukcesis bone anticipi ŝiajn decidojn. Fine mi laciĝis. Nur tiam ŝi reiris en la neston kaj tuj reflugis.
Mi provos denove pacienci spionante morgaŭ... eble!

Marcelo

De fadeno al kudrilo…

de *Ne timigas nin ruinoj*
al *Kia estos morgaŭ?*

Ĉio komenciĝas per retalvoko de Flo el Tuluzo la 2an de decembro 2023 : Saluton Marcelo, estas serĉata tradukisto de la subtitoloj en esperanto de la filmo *Nous n'avons pas peur des ruines*, pri la rezistado en Exarcheia memmastrumita kvartalo de Ateno en Grekio. Ĉu vi konas liberecanan kompanon, kiu pretus tion fari? legu ĉi sube pri kio temas ...

Post mia tuja respondo, la reago de Flo estis samtage spontana: Dankon por via respondo Marcelo. Temas pri la traduko de la subtitoloj de la tuta filmo. Mi petos al Yannis Youlountas la tekston de la tuta filmo por sendi ĝin al tiuj, kiuj pretos ĝin traduki esperanten. Mi ne konas jam la longecon de la tuta filmo... La baza subteksto estas en la franca, se aliaj emus ankaŭ traduki en aliajn lingvojn, ili estas bonvenaj. en la maldestra kolono aperas jam la tradukitaj lingvoj. Mi esperas, ke Esperanto baldaŭ aperos tie! Dankon pro via helpo por tiu propono...

Yannis Youlountas la reĝisoro prezentis la koncernan filmon en la bordoza kinejo Utopia la 2an de februaro 2024. La spektado de tiu filmo pruvis ĝian valoron kaj ke ĝi nepre aperu ankaŭ kun esperantaj surskriboj. La postfilma debato inter la reĝisoro kaj la publiko en la plenplena salonego *Toussaint Louverture* (186-sidloka, la plej granda de la kinejo) montris ne nur intereson, entuziasmon sed ankaŭ aplaŭdajn komentojn. Tiam per la mikrofono mi demandis, kiam ni ricevos la definitivan kompletan filmon, por prilabori la surtekstojn en Esperanto? Responde Yannis ridetis kaj klarigis, ke dum du monatoj okazas tra Francio kinejaj elmontroj de 75-minuta, nedefinitiva versio. La reagoj de la publikoj helpos munti la lastan version fine de la tumeo. Kaj tiam, promesite, li sendos al ni la necesan materialon, ĉar gravas por li, ke estu Esperanta versio.

Surprize konkludis la vesperon muzika interveno de Christian Leduc. Ni vidis lin en la filmo kanti en Grekio, kien li transportis varojn por la loĝantoj de la atena kvartalo Exarcheia. Kaj antaŭ ol kanti Christian prezentis sin kaj aldonis, ke li volonte renkontus la personon, kiu ĵus parolis pri Esperanto, ĉar li dezirus Esperantan tradukon de kanzona filmeto, kiun li volonte enretigus.

Tial fine de la entuziasmiga kanzono *Je suis un fils** (de kebeka grupo *Corrigan Fest*) mi aliris la artiston kaj ni interŝanĝis niajn kontaktojn. Sekvis interesaj interŝanĝoj. Unua rezulto estis la traduko de lia teksto *Que sera demain ?* (versio nekantebla). Ĝin Christian ŝovis sur la filmeton kaj li perrete publikigis ĝin: https://www.viny.org/w/wNG8bfdGF4h7R6gc8yuvKM

<u>Nia tasko estu nun disvastigi tiun ligilon por famigi ĝian version kun la Esperanta surteksto.</u>

Sekve Christian petis informojn pri Izabela Martinez, kiu iam inicis lin al Esperanto en Angulemo. Lin kortuŝis la ekscio pri ŝia forpaso « Saluton Marcelo, Merci pour ces documents que je vais garder précieusement. Je suis tout retourné. Très ému. Je me doutais bien de son décès. Maintenant, c'est certain. Me reviennent en mémoire ses témoignages de vie, l'espéranto qui était très populaire dans l'Espagne libertaire, sa participation aux jeunesses libertaires à Barcelone alors qu'elle était si jeune, Gines que j'ai toujours connu malade et dont elle prenait grand soin, il avait été capitaine il me semble dans l'armée républicaine... Oui elle était passionnée par l'Espéranto. Et toujours humble et bienveillante envers les humains. Une belle personne que je suis heureux d'avoir rencontréé. Amike »

* *Por spekti la version de la ĝirondia grupo* La fille du pirate : https://www.youtube.com/watch?v=E93f1jYu4ll

Christian Leduc

Que sera demain ?

À toi l'enfant en éclosion,
fleur des nouvelles générations
parmi les humains monnayés
sur une planète abîmée.
L'ère des ressources gaspillées
a commencé de s'effondrer.
Quand tout va changer dans
l'urgence :
je te souhaite « bonne chance »

Refrain/ Que sera demain ?

Le vieux monde craque de tous
côtés.
Tout ce qui est vivant est en danger.
L'idéologie du pillage
nous a conduits à ce naufrage.
Mais les rebelles s'entraident pour
des utopies qui voient le jour.
Quelles couleurs pousseront
demain ?
Ça dépend de toi, de chacun.

Refrain/ Que sera demain ?

Je te souhaite de vivre longtemps,
de t'épanouir harmonieusement,
de mettre en commun tes talents,
libre entre égaux, naturellement.
Et des sourires en arc-en-ciel,
Et des baisers au goût de miel,
Sans haine, sans peur, ni dieu, ni
maître,
Je te souhaite simplement... d'être.

Refrain/ Que sera demain ?

Kia estos morgaŭ?

Al vi, ekfloronta infano,
Floro de la novaj generacioj
Inter la monigitaj homoj
Sur damaĝita planedo.
La erao de la disipitaj resursoj
Komencis disfali.
Kiam ĉio urĝe tuj ŝanĝiĝos:
Mi deziras al vi « bonŝancon »

Rek. Kia estos morgaŭ?

La malnova mondo ĉiuflanke
kolapsas.
Ĉio vivanta estas en danĝero.
La ideologio pri forrabado
Kondukis nin al tiu pereo.
Sed la ribeluloj kunhelpas sin,
Por ke utopioj ekrealiĝu.
Kiuj koloroj kreskos morgaŭ?
Dependas de vi, de ĉiu.

Rek. Kia estos morgaŭ?

Mi bondeziras al vi longe vivi,
Harmonie disradii,
Komunigi viajn talentojn,
Libera inter egaluloj, nature.
Kaj ĉielarkajn ridetojn,
Kaj mielgustajn kisojn,
Sen malamo, sen timo, nek dio, nek
mastro,
Mi simple bondeziras al vi... esti.

Rek. Kia estos morgaŭ?

Paroles et musique de Christian Leduc en Creative Commons BY NC SA

Nepre spektu la filmeton de la kanzono kun la esperantaj surtekstoj kaj senrezerve disfamigu ĝin:

https://www.yiny.org/w/wNG8bfdGF4h7R6gc8yuvKM

Christian LEDUC loĝas apud La Réole.

"Chansons artisanales et rebelles"

https://www.yiny.org/w/pvxN6aMoke87b1cA6DmozT

Spectacle de chansons artisanales et rebelles. Une guitare à textes. Des chansons à cordes.
Une voix chaleureuse. Une pointe d'humour drôle ☺
Et... tellement de sensibilité ! Ce joueur de mots et de notes chante passions et révoltes depuis une trentaine d'années dans les lieux à taille humaine de liberté d'expression !! La bande-annonce a été filmée lors d'un concert chez l'habitant en sud-Gironde.

"Barricades - Mémoires de partageux"

Avec ce spectacle, Christian Leduc nous convie à un voyage musical mémoriel dans les racines libertaires de l'Histoire des révoltes sociales. En plus de quelques-unes de ses chansons artisanales et rebelles, il interprète à sa façon des créations (ou reprises) de Jean-Baptiste Clément, Igor Agar, Serge Utge-Royo, LaReplik, Marc Ogeret, Le Cri du Peuple, Jules Jouy, Michèle Bernard, Agnès Bihl, Ralph Chaplin, Jean Baumgarten, Paul Paillette, Corrigan Fest, La Fiancée du Pirate, Étienne Roda-Gil, Bérurier Noir, la Compagnie Jolie Môme, René Binamé, Louise Michel,...

https://www.yiny.org/w/efiJPopnQ43pJnkjXydCeF

Christian Leduc - c/o Gavroche Prod
7 ldt Bouron - 33190 Loubens
05 56 71 31 24 contact.gavroche-prod@orange.fr

Jarfina koncerto en Pesako

Ĉu ankaŭ Zaza kunlevis la pugnon?

Pretekste de la Zamenhof-tago Esperanto-Gironde organizis eventon en Pesako la 8an de decembro 2024: koncerto de Christian Leduc malfermita al ekstera publiko. Nin akceptis la kvartala sindikato *France* en sia tre bela kaj tute adekvata salono *Salle de France*, situanta je la numero 39 de la strato Anatole France.

Bela sukceso!

Dank' al informado per afiŝoj tra la kvartalo dise gluitaj de Elvezio kaj Jean-Seb, ankaŭ radioanoncoj ekzemple ĉe *La Clé des Ondes*, kaj retejoj kaj komunikoj de Dominiko tra diversaj elektronikaj vojoj, sufiĉe abunda publiko envenis por spekti kaj aŭskulti seninterrompe dum preskaŭ du horoj engaĝitan spektaklon.

La dekoraĵo, kiun la publiko admiris tuj enirinte, levis ĉiujn ajn dubojn pri la spirito de la tuto. La vasta tegita tolaĵo ornamita de diversepokaj ribelantoj (Louise Michel, Elisée Reclus, Nestor Maĥno, k.a.) jam multon rakontis.

Frumatene jam Hervé, Jean-François, Elvezio, ankaŭ Eric kaj Marcelo helpis la artiston por elaŭtigi kaj instali la materialon. Dume Gloria, Claudine kaj Katya ekpreparis la trinkejon.

Kvindeko da ĉeestantoj, inter kiuj triono da geesperantistoj, plene ĝuis la prezentadon de Christian. La tutan repertuaron akompanis komentoj, priskriboj, enkondukaj klarigoj de la kantisto. Aŭdiĝis ritmaj manfrapoj kaj eĉ kunkantado tra la salono. Foje entuziasmaj pugnoj leviĝis. Laŭtaj aplaŭdoj kronis la finan bison. Eĉ finance ni preskaŭ sukcesis ekvilibri la elspezojn: la kasisto ne ploris pro doloriga mona monperdo! Kaj la ĝenerala kontento grave kompensas materialan malprofiton.

Dankon Christian pro tiu entuziasmiga, esperdona programo!

Retmesaĝa reago de Dominiko la morgaŭon:

Saluton,

Mi diris : "Bonege! Tiu spektaklo estis bonega, ĉar ĝi konsistis ne nur el kantado, sed ankaŭ el leciono pri historio kun multe da humuro. Ni multe lernis, pri kiu gravas en nia socio.

Mi tute ne komprenas kial la kantisto Christian La DUKO (LEDUC) nomiĝas tiel, kial li ne ŝanĝis sian familian nomon?"

Jes mi kredas, ke tiaj rendevuoj estas bonegaj por disvastigi Esperanton. La publiko estis homoj kiuj bone komprenas la fratecon de Esperanto, kaj ni "varbis" novajn Esperantistojn.

Ĉu ni povas fari saman spektaklon venontan jaron?

Mi aktuale zorgas pri la Festo de la libero (Fête du Libre : logiciel, matériel, langue, monnaie, société...) kaj sendas al vi kun tiu retmesaĝo la prezon de la salono La Halle des Douves. Eble oni povos fari tie nian venontan spektaklon. Ni povus fari tion kun alia asocio kaj ne pagi la salonon. Kun alia asocio, ni povos havi ankoraŭ pli da partoprenontoj.

Ĉu iu ajn havas ideon pri la venonta koncerto?

Amike,

Dominiko

Renkonto kun *La Pangée*

La poésie des langues
La poezio de la lingvoj

Sekve al renkonto en *La Grajneto*[1] inter Dominiko kaj Médéric, el la asocio *La Pangée*, okazis interesegaj interŝanĝoj ĵaŭdon la 20an de februaro inter la 17h kaj la 20h en la kulturcentro *Bazaro de la fosaĵoj* en la kvartalo *Capucins (Kapucenoj)* de Bordozo. Antaŭ la alveno de la publiko la intervenontoj konatiĝis: Médéric kaj Paco, la organizantoj, kaj Ibrahim, Katja kaj Marcelo, la invititoj.
La prezento estis tre amika kaj informodona. La temon de la diskuto "lingvoj, transdono kaj rezistado" bone enkondukis Médéric kaj Paco. Riĉa estis la prelegeto de Ibrahim, kurda irana elmigrinto, pri la historio de la kurda kaj persa lingvoj. Li impone substrekis la rolon de muziko kaj kantado por pluvivigi tiujn lingvojn, malpermesitaj mezepoke dum du jarcentoj, kiam regis muzulmanoj.
Poste Marcelo prezentis specifajn aspektojn, historion, gramatikon kaj belsonon de Esperanto kaj respondis al demandoj pri propraj uzoj de la internacia lingvo, familiaj kaj artaj. Katja argumentis ankaŭ pri la utilo de Esperanto por lerni la francan kaj parolis pri la persekutoj de la ukraina lingvo dum la soveta epoko kaj aludis pri la filmo projekciita la antaŭan tagon en la universitato kun rolo de poezio por ribeli, rezisti cele al konservi sian denaskan lingvon.
Bedaŭrinde la publiko estis... tre malmultnombra! Tamen kvalita: ĉeestis Hervé! Dominiko kaj Eriko alvenis post la renkonto samtempe okazinta en la Grajneto. Inter la ses aliaj personoj, krom geamikoj de *La Pangée* ankaŭ sidis Céline Papin, vicurbestrino de Bordozo, misiita por la teritoriaj eŭropaj kaj internaciaj kooperadoj, kaj

[1] *La Grajneto*: asocia, kultura kaj solidara trinkejo, kie Esperanto estas regule prezentita la trian ĵaŭdon de ĉiu monato. Ĝi situas sur placo *Jacques Dormoy* en Bordozo (stacidoma kvartalo)

supera instruado kaj esplorado. Ŝin akompanis la direktorino de la koncerna fako en la urbodomo. Ambaŭ ili montris entuziasmon pri la vespero kaj la vicurbestrino ŝajnis sincera, kiam ŝi diris, ke ŝi foriras konvinkita pri Esperanto kaj pretus eklerni... se tempon ŝi disponus por tio!

La lastan duonhoron la ĉeestantoj partoprenis atelieron por malkovri la tradician iranan instrumenton *daf*. Hervé, Katja kaj Marcelo provis sekvi la ritmojn de Ibrahim, li mem tre lerta ludanto. Li kunkreis muzikgrupon, kiu konsistas el kvar homoj el kvar diversaj lingvoj kaj kulturoj: kurda, siria, albana kaj franca. Kaj ili vole elektis kiel nomon esperantan verbon por MIKSI-band. Malkovrinda grupo!

La Pangée entuziasme proponis refari tiajn renkontiĝojn... kial ne eĉ regule, ĉiun trimonaton?...

83a Hispana Esperanto-Kongreso

Soria 1a - 4a majo 2025

Raporteto pri HEK 2025

Klodin' kaj Marcelo listiĝis inter la 150 partoprenantoj de la 83 Hispana Esperanto-Kongreso okazinta de la 1a ĝis la 5a de majo 2025, en la malnovkastilia urbo Sorio. La kongresejo situis en la kultura centro Espacio Santa Clara, malnova monaĥejo, tute restaŭrita en la pasinta jaro, kiu disponas je ĉiuj necesaj eroj por la okazigo de la kongreso: salonoj, kunvenĉambroj, ripozejoj.

La etoso estis varme amika, kiel kutima al multaj E-aranĝoj en kiuj ni partoprenis, des pli ke la plejmulto de la organizantoj estas ankaŭ SAT-membroj. Ni do jam plurfoje antaŭe renkontis ilin kaj kunlaboris dum kongresoj i.a. en Madrido, Barcelono kaj ankaŭ Oporto lastan someron.

La programo estis aparte riĉa. Ofte pluraj prelegoj aŭ prezentoj okazis samtempe. Ni do devis elekti kion aŭ kiun spekti. Ni menciu ekzemple tre interesajn prelegojn:

- Encarna Teruel, doktoro pri neŭrolingvistiko, kiu ĉefe laboris kiel neŭropsikologo kaj psikoterapiisto en klinika medio en Berlino, prezentis *la integristan psikopaton*[1]. Ŝia unua bildo montris faman portreton de la aktoro Antonio Hopkins rolante Hannibal Lecter en la filmo *La silento de la ŝafidoj*. Kaj post tre klara prezento de la simptomoj kaj analizoj de la patologio, ŝi asertis ke bedaŭrinde homoj naskiĝas jam psikopatoj, ke tion ŝi profesie konstatis akceptante senhelpajn gepatrojn kun tiaj tre junaj infanoj. Sekvis ŝia demonstro ke malmultaj estas enfermitaj, ke kelkaj publike aktivas kaj ŝiaj lastaj bildoj prezentis Orban, Bolsonaro, Milei, Netanyahu, Putin kaj Trump!

[1] PIV Homo en stato de psika malordo, karakterizata precipe de neregataj impulsoj, humora nestabileco k nekapablo adapti sin al la medio, kio ĝenerale kondukas al kontraŭsocia konduto.

- Jose Maria Salguero (Kani) entuziasme prezentis la rolon de Portugalio dum la Enlanda Milito reliefigante la ne tiel ofte priparolatan apogon inter si de la regantaj klasoj dum la popolo helpis rifuĝintoj. Kaj tiu prelego rolis kiel tute taŭga enkonduko al nia prezento de Aristides de Sousa Mendes.

- Abel Montagut, jam konfirmita kataluna poeto kaj tradukanto, parolis pri la malfacilaĵoj, kiujn li renkontas en sia nuntempa projekto: traduki la verkon de Homero *La Odiseado* verse!
- Tonjo de Barrio, transpreninte ĉe UEA rolon de kunordiganto de la informoj pri ZEOj, parolis pri plej diversaj 'fizikaj spuroj' de Esperanto, kun fotoj pri stratoj, monumentoj, k.a. multloke sur la tero sed ankaŭ tra la universo!

Inter la ekskursoj aparte plaĉis la vizito al Numancia, keltibera loko, kie restaĵoj plu atestas pri lokaj prauloj, kiuj rezistis fronte al la romiaj legionoj de Scipiono.

Sorio estas urbo de la poetoj Antonio Machado, Gustavo Adolfo Dominguez Bastida, Gerardo Diego Candoya, Juan Antonio Gaya Nuno, sed ankaŭ Maria Angeles Maeso, engaĝita poetino, omaĝita dum la poezia vespero. Favora al Esperanto ŝi ĉeestis kaj tre emocie aŭskultis la tradukojn de pluraj el ŝiaj poemoj legitaj de la organizantoj, inter kiuj la poeto Miguel Fernandez, la tradukinto.

Ni tie ankaŭ ĝuis amuzajn animadojn, kiel klaŭnajn magiaĵojn de Tonĉjo kaj Peĉjo (tre ŝatataj de infanoj sed ne nur...) aŭ kvazaŭ-televidan kvizon kun Tonjo de Barrio.
Vespere koncertoj estis programitaj inter la 22h kaj 24h! Jomo plu plezure dancigis la publikon, kiu kunkantis internacian repertuaron multlingve sed ĉefe en esperanto, kompreneble!
Bedaŭrinde pro grava urĝa enhospitaligo de unu membro Kaj Tiel Plu devis rezigni animi la dimanĉan vesperon. Lastminute la organizantoj sukcesis venigi la junan Klarisan el Italio. Ni unuafoje spektis ŝian koncerton en la Eŭropa Kongreso en Strasburgo.
Laste menciindas, ke la libroservo en tri horoj disvendis la ok Brassens-librojn, kiuj ni kunportis tien. Dankon Manolo!

Gratulojn kaj dankegojn al Mati Montero kaj Ana Manero, ĉefaj instigintinoj kaj organizintinoj de tiu kongreso en Sorio, sed ankaŭ al iliaj kunkulpuloj, kiuj ebligis belan disvolviĝon de tiu agrable memorinda renkontiĝo.
La venontjara HEK okazos proksime al Bilbo, ĉu tio ne logas vin?

Pri la prezento de Sorio, ne hezitu spekti la 4-minutan filmeton:
https://www.youtube.com/watch?v=PybHVJNavyk

Honore al Seán!

Vicprezidanto de ESPERANTO-GIRONDE
iĝis 1a vicprezidanto de la UEA

Nia loka asocio Esperanto-Gironde de pli ol sesdek jaroj ne nur informas pri la internacia lingvo kaj instruas ĝin, sed ankaŭ praktikas ĝin loke dum siaj kunvenoj, kaj naci- kaj internaci-skale. Ĝiaj membroj regule (aŭ ne) nutradas korespondadojn, gastigas vizitantojn, vizitas kaj organizis kongresojn (SAT, SAT-Amikaro, LIBE, Esperanto-France, IFEF), kreas artaĵojn kaj publikigas valorajn informilojn (LEGI) kaj broŝuretojn. Kaj asociskale ne forgeseblas la oficiala ĝemeliĝo kun la Eŭska Esperanto Asocio subskribita en 1992 kadre de la Ĝenerala Konsilio de Ĝirondio.

Ja la esperantista mondo ŝajnas malgranda, tamen konsiderindas la valora historio de la ĝirondia anaro, kiu vivigis Esperanton jam de la komenco de la dudeka jarcento (eble eĉ jam de la fino de la deknaŭa, kvankam ni ne heredis oficialajn atestojn pri tiu fruo).

Esperanto-Gironde, kiel multaj (se ne ĉiuj) ceteraj lokaj grupoj aŭ kluboj, konsistas el diversaj membroj, kiuj malsamnivele scipovas la lingvon. Kaj ni ĝojas akceptadi novlernantojn, "eternajn" komencantojn, same kiel bazajn kaj fluparolantojn. Kaj ĉiuj siapove kontribuas pluteni la amikan etoson, kiu gvidas niajn agadojn. Kaj tio

gravegas! Inter la ĝirondaj aktivuloj kelkaj eminentuloj elstaris internaciskale. Ne ofendiĝu la necitotaj gekamaradoj, ne eblus listigi ĉiujn en tiu numero de LEGI, tamen ekzemple citindas Charles Brunet, kiu venigis en Bordozon sian amikinon, Lidja Zamenhof, dufoje en la jaroj 1933 kaj 1934, kaj Ivo Peyraut, kunfondinto kaj unua prezidanto de nia asocio, kiu iĝis prezidanto de SAT okaze de la kongreso en Artigo-apud-Bordozo en 1984. Ankaŭ la nomo de Rolando Levrault indas aperi ĉi tie pro i.a. lia grava rolo en la publikado de renovigita PIV. Kaj mi finos per La Kompanoj, tiu teatra kaj kanta trupo, kiu triumfis (ni ja restu modestaj, ĉu ne?) animante neforgeseblan inaŭguran vesperon de la 100a UK en Lillo en 2015.

Alvenis Seán kaj jen nova dimensio!

Sed ĉi jare, jen nova ŝtupo atingas Seán, nia tute nova vicprezidanto: la komitato de UEA, kunveninte la 26an de julio dum la UK en Brno, elektis lin 1a vicprezidanto de UEA! Kompreneble neniun meriton Esperanto-Gironde rajtas postuli de tiu evento, sed endas saluti kaj gratuli Seán pro tiu oficiala agnosko de lia kompetenteco. Indas mencii, ke inter ĉiuj kandidatoj, Seán ricevis plej multajn voĉojn (30). Ni ankaŭ danku lin pro lia afabla partopreno en nia loka aktivado, kvankam li samtempe de nun respondecas pri la eksteraj rilatoj kaj kontaktoj de UEA kun internaciaj organizaĵoj. Grava kaj ampleksega tasko!
Sciu ni plu vivigi nian amikecon kaj kunaktivadon!

Marcelo

La komitato kunsidas en Brno. Foto: Paweł Fischer-Kotowski.

pliajn detalojn vi legu sur **Libera Folio** ĉe:
https://www.liberafolio.org/2025/07/26/uea-havas-novan-estraron/

AGADI POR LA INTERNACIA TAGO DE PACO KAJ LA EŬROPA TAGO DE LINGVOJ

Gekaraj,

Informcele, la mesaĝon kiun faris la Sekretario de EEU, Luigi Fraccaroli, kun mi, kaj sendis al la landaj asocioj en la 27 EU-landoj.

Amike.

Seán

From: informa-reto-pri-Esperanto@groups.io <informa-reto-pri-Esperanto@groups.io> **On Behalf Of** Luigi Fraccaroli @Esperanto via groups.io
Sent: Friday 22 August 2025 13:49
To: informa-reto-pri-Esperanto@groups.io
Subject: [informa reto] Semajno de Lingvoj kaj Paco 2025: estas tempo por aktiviĝi

Estimata,

Septembro alproksimiĝas, kaj kun ĝi du datoj tre gravaj por nia Movado kaj nia Kontinento: la *Internacia Tago de Paco* (la 21-an) kaj la *Eŭropa Tago de Lingvoj* (la 26-an). Kiel pasintjare, EEU proponas kunligi tiujn du datojn en la "Semajno de Lingvoj kaj Paco". La temo elektita ĉi-jare de Konsilio de Eŭropo kaj Eŭropa Komisiono por la Tago de Lingvoj estas aparte alloga, ĉar vere kongrua kun niaj celoj, nia vivmaniero, nia aliro al la monda interkompreniĝo: "**Lingvoj malfermas korojn kaj mensojn!**" (vidu ĉe la retejo https://edl.ecml.at/ por la mesaĝo en via(j) nacia(j) lingvo(j)). Ĝi tute taŭgas do ankaŭ por la Tago de Paco, ĉar -–kvankam supraĵe iom naiva– ĝi donas la veran esencon de nia ekzisto, tia, kian imagis, bildis kaj puŝis Zamenhof mem. Krom tio: la instanco, kiu ĉiujare aranĝas la Eŭropan Tagon de Lingvoj, havas sian sidejon en la urbo gastigonta la 111-an UK, nome Graz (Aŭstrio)! Ekzistas do pluraj facetoj de la juvelo nepre briligindaj por kapti kaj reflekti plejble da verda lumo.

EEU proponas, do, ke vi

1. prenu de la retejo la mesaĝon en via nacia lingvo;
2. aldonu al ĝi la mesaĝon en Esperanto;
3. sendu ĝin al viaj amaskomunikiloj kun la sugestita akompana mesaĝo (vidu poste) elesperantigita al via(j) nacia(j) lingvo(j);
4. klopodu esti intervjuataj pri la temo;

sendu al viaj parlamentanoj kaj (se EU-lando) eŭropaj parlamentanoj la sugestitan leteron (vidu poste) elesperantigitan al via(j) nacia(j) lingvo(j).

Samtempa (aŭ preskaŭ) kampanjo en pluraj landoj en la tuta kontinento montros, ke Esperantujo ne estas unu monolita bagatela sekto, sed male multkapa, disfloranta, eferveska, bunta kaj nesubpremebla tutmonda realaĵo.

Jen sugesto pri mesaĝo akompana al peto por publikigo en amaskomunikiloj:

“Por taŭge celebri la ĉi-jarajn Internacian Tagon de Paco kaj Eŭropan Tagon de Lingvoj (respektive la 21-a kaj 26-an de septembro), la {Landa Asocio}, sub aŭspicio de Eŭropa Esperanto-Unio, volonte kaj ĝoje iniciatas la “Semajnon de Lingvoj kaj Paco” 21-26.septembro.2025. La temo de la ĉi-jara Tago de Lingvoj, “**Lingvoj malfermas korojn kaj mensojn!**”, priskribas en ne plibonigebla maniero la efikon de la lernado de la internacia lingvo Esperanto sur la lernantoj: efektive, la internacia lingvo igas la teorian vorton “interkompreniĝo” ĉiutagan konkretaĵon, la idealon “frateco” tute normalan vivstilon, la sopiratan deziron “paco” la solan manieron kunvivi. La {landaj} kaj eŭropaj esperantistoj invitas ĉiujn civitanojn aliĝi al la plej internacia komunumo de la tuta mondo, kie ĉiuj lingvoj estas plene kaj egalrajte respektataj, kaj ĉiuj koroj kaj mensoj estas vaste malfermitaj!

Informoj pri la lingvokursoj ĉe {landa retejo} kaj ĉe edukado.net, esperanto12.net aŭ lernu.net. Krome, mallongaj kursoj de Esperanto povas plifaciligi kaj plirapidigi la lernadon de fremdaj lingvoj: por informiĝi pri tio, vizitu lernu.net/instruado, kie vi trovos informojn pri la MultLingva Akcelilo. Aldone, pli da informoj pri 28 lingvoj en Eŭropo vi trovos en la multlingva retejo pri lingvoj lingvo.info.”

Al tiu mesaĝo, se vi jam pretas aranĝi ion apartan, vi povas aldoni viajn iniciatojn. Sugesto ĉiam valida: kantu la eŭropan himnon en Esperanto! Substreku, ke ĝis nun la landoj de Eŭropo sukcesis interkonsenti nek pri teksto nek pri lingvo per kiu kanti la eventualan tekston (ekzistas nur la muziko, de Ludwig van Beethoven) – do Esperanto estas la plej taŭga elekto por tutkontinenta himno. Je tiu ligo is.gd/europahimno trovu tekston kaj muzikon.



jOmO

Nia kara tuluza artisto jOmO verkis la ĉi-tiun artikolon por la reta gazeto en okcitana lingvo ***Jornalet***[1] (kies direktoro estas Farri, Ferriol Macip i Bonet, esperantisto, muzikisto de Kaj Tiel Plu).

KNEECAP, LA GRUPO KIU KANTAS EN IRLANDA LINGVO

Nuntempe estas sur la ekranoj de la franca ŝtato filmo[2], kiun oni povas vidi ĉefe en la kinejoj *Art et Essai*, sed ne tro en la komerca reto, kaj kiu temas pri irlanda repgrupo, kiu havas la specifecon kanti ... en la irlanda, la lingvo kiu nomiĝas *Gaeilge na hÉireann* kaj kiu estas, laŭ la UNESCO, en la listo de "endanĝeritaj lingvoj" (kie la okcitana estas "malfortika").

Seán[3], esperanta irlanda amiko, klarigis al mi ke la nomo de la grupo signifas "patelo" kaj aludas al la fakto ke, inter 1972 kaj 1989, IRA, kiu kontrolis la katolikajn regionojn de Nord-Irlando, kutimis doni du tagojn al krimuloj aŭ drogvendistoj por forlasi la landon, se ne, la puno estis ricevi kuglon en la genuon. Plie, estas kaŝita vortludo kun la irlanda lingvo mem, kie *ní cheapaim* signifas "mi ne pensas", kaj kiu prononciĝas pli malpli sammaniere.

---

[1] https://www.jornalet.com/opinion/23557/kneecap-grop-que-canta-en-irlandes
[2] spektu ekstraktaĵon: https://www.allocine.fr/film/fichefilm_gen_cfilm=323071.html
[3] Seán Ò Riain, diplomato, publikigis en 2001 dulingvan (angla kaj irlanda) libron kun titolo *An Ghaeilge agus an tAontas Eorpach - Féinitúlacht agus Éagsúlacht Teanga/The Irish Language and the EU - Identity and Linguistic Diversity* ("La irlanda lingvo kaj la EU - Identeco kaj lingva diverseco") kun la subteno de ministerio de edukado. En ĝi li favoras al uzo de Esperanto en la eŭropaj institucioj.

Tiu amiko, forta subtenanto de la irlanda, tre ŝatas la laboron, kiun faras tiu grupo por la lingvo en direkto de la junularo, sed malpli ŝatas la uzon de la temoj de perforto kaj drogo en la tekstoj, kiel la ĝenerala konduto de la grupo.

Ĉar la triopo, formita en 2017 per Liam Óg Ó hAnnaidh, Naoise Ó Caireallâin kaj JJ Ó Dochartaigh (mi donas la irlandan ortografion kun plezuro), iomete kolektis la polemikojn kaj la malpermesojn. Ilia unua kanto, *C.E.A.R.T.A.* estis malpermesita eĉ je *RTÉ Raidió na Gaeltachta*, kiu estas publika radistacio tute en la irlanda, pro "referenco al drogoj kaj insultoj". Tiu ĉi kanto estis verkita post aresto de unu membro de la grupo per polico ĉar li grafitiis sur bushaltejo la vorton *cearta,* kiu signifas "rajtoj", ĉar estis la antaŭtago de la tutnacia manifestacio favora al rajto de la irlanda lingvo. En policejo, li rifuzis paroli la anglan, (tio estas montrita en la filmo) kaj la policistoj devis iri serĉi tradukiston.

La politikaj principoj de la grupo estas fortaj, certe pri la sendependismo de Ulstero rilate al Unuigita Reĝlando (ili ŝatas skandi *Brits Out !* dum la koncertoj), sed ankaŭ kontraŭ polico aŭ favore al Palestinanoj, kaj pro tio ili ricevis pli ol unu malpermeson, kiel je la festivalo *Sziget* de Budapeŝto (la plej granda de Eŭropo) aŭ provojn de malpermeso, kiel dum *Rock en Seine*, kie la urbodomo rifuzis doni sian monhelpon de 40.000 eŭroj pro la alveno de la irlanda grupo.

En junio 2025, la BBC rifuzis elsendi la koncerton de Kneecap en la festivalo de Glastonbury post la peto de elprogramigo de la ĉefministro, kaj la grupo skandigis per la publiko *F* *k Keir Starmer !*

Ni bone konas la premon de la angla lingvo sur la muzikan produktadon, ni do povas imagi ĝin en lando, kie ĝi estas oficiala. Estas interese ke tia grupo povis trovi propran bonan lokon en la kultura pejzaĝo. Eble la parfumo de skandalo helpas multe, ĉefe en direkto de junularo.

En 2022, 1,8 miljonoj da homoj parolis la irlandan lingvon, tio estas 40% de la loĝantaro de Irlando kaj plibone ol 2016, kiam la procento estis nur 34% (2002 = 30%), eĉ se la ĉiutaga uzo iomete malaltiĝas. Sed la intereso por la lingvo estas pli forta ĉe junuloj ol ĉe maljunuloj, kaj estas tre pozitive.

Plie, nuntempe la lingvo estas taksita kiel "mojosa" (*cool*), kaj eniris en la artan kulturon (muziko, literaturo, humuro, medioj).

En Ulstero, *Gaeilge* estas agnoskita kiel "komunuma lingvo" kaj kvar deputitoj parolas la irlandan en la Asembleo de Norda Irlando. En 2022, la lingvo ricevis finfine sian statuson de oficiala lingvo de Europa Unio. 200 irlandparolantaj personoj laboras en la institucioj.

*** ** * ** ***

ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * * * *

Adreso ĉe la prezidanto

* * * * * * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne
UFR Langues,
Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac
Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Vic-Prezidanto: **Seán Ó RIAIN**
98 route du Mouquet
40160 Parentis-en-Born

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasisto: **Yannick DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 06 84 11 26 95 / yannickdum@aol.com

* * * * * * *

Kontribuojn por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr

La venontaj kunvenoj okazos en la Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC, je la 10a30:
la 28a de septembro, la 26a de oktobro, la 23a de novembro kaj la 14a de decembro